

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1993 — 1

(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la Mikaelmonto kaj



... de ŝminko al drinko

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
Pri Miĥael-Monto (S. Boniol)	3-5
De ŝminko al drinko (B. Golden)	6-7
Eùropo konkeras la mondon (F.Boyet)	8-10
Monte Kristo (sekvo)- AL. Dumas trad: R. Dupuis	11-13
Por via Distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

Ankaù ĉi-jare la Printempa periodo dediĉita al Internacia Renkonto de Infanoj anonciĝas plensukcesa. Aliĝis 50 geknaboj, kiuj venos kun siaj instruistoj aù gepatroj ĉefe el Francio sed ankaù el Hungario kaj el Britio. Ili ricevos financan helpon de GEE kaj de Gresillon. Plie, la Esperanto-Domo enkasigis proksimume 10 000 frankojn por la Fonduso Infan-Renkonto. Kvankam nesufiĉa (ni devis rifuzi la partoprenon de grupo da geknaboj el Rusio pro la vojaĝ-kostoj), tiu sumo ebligas la venon de multaj el la junaj partoprenontoj. En la nomo de la subvenciitoj ni kore dankas ĉiujn el vi, kiuj, laù siaj ebloj, sendis sumojn tiucelajn.

La Fonduso daùre ricevas sumojn, eĉ sumetojn, ĉar ni devas pensi pri la venontjara organizado. Sendu viajn financajn kontribuaĵojn al la poŝtkonto Maison Culturelle Esperantiste, Nantes 1485 39 P. Ankaù bankĉekoj estas akceptataj kompreneble. Sed ne forgesu precizigi "Por la Fonduso Infan-Renkonto".

Por la somero regule alvenas informpetoj kaj ankaù aliĝoj. Ĉu la nombro da ĉeestantoj, kiu iom malkreskis lastjare denove kreskos? La respondo dependas de vi ĉiuj. Aliĝu! Aliĝigu viajn korespondantojn, kiuj post la oranĝarboj de Hispanio aù la rozoj de Bulgario ŝatus trovi ombron sub la altaj arboj de la Grezijona parko. Ĝis baldaù.

D-ro Juan Regulo-Perez mortis. Denove forlasis nin eminenta esperantisto, verkisto, akademiano, kreinto de la eldonejo Stafeto. Kondolencoj iras al la tuta esperantistaro.

Esperanto tra la Mondo

ESPERANTO EN KOLEGIO DE FRANCIO- Umberto Eco, la fama specialisto pri lingvoj kaj aùtoro de la romano "La nomo de la rozo", faris serion da prelegoj en la prestiĝa Kolegio de Francio. Li detale kaj objektive longe parolis pri esperanto. Ankaù en antaùaj intervjuoj li sin montris tre favora al la internacia lingvo.

ALIA LINGVISTO,FRANCA, Claude Hagège, kiu verkis du paĝojn pri esperanto en sia lasta libro "le souffle de la langue" (La lingvo-blovo) estis multfoje intervjuita en televido radio kaj gazetaro. Surprizita de la multaj reagoj de esperantistoj li pli kaj pli estis prudenta kaj objektiva en siaj respondoj.

KONGRESOJ- La 48-a Kongreso de SAT-AMIKARO okazos de la 9-a ĝis la 13-a de aprilo 1993, en Hérouville-Saint-Clair, apud Caen, Francio. Informoj kaj aliĝiloj: Yves Nicolas, 17-37 Quartier du Bois, 14200-Hérouville

Someraj Esperanto-kursoj en la Ŝtata Universitato de San-Francisko Usono. Informas: Cathy Schulze, 410, Darrell Rd., Hillsborough, CA 94132 USA. Datoj: 24-a de junio ĝis 16-a de julio.

Ruslanda Esperanto-Asocio, pk 67, RUS-620077 Jekaterinburg, organizas, de la 1-a ĝis la 14-a de junio, internacian transsiberian vojaĝon al Bajkala lago.

Internacia Medicina Konferenco en VESZPREM (Hungario), 8-11an de julio. Informas: D-ro Istvan Hegyi, Battyany u. 19, D2/9, H - 8200 Veszprem.

Internacia Vegetarana Esperanto-Renkontiĝo, en Cluj-Napoca, Rumanio, 17-21an de julio. Inf. Esperanto-Asocio Kluĵo, C.P. 1111, R-3400 Cluj-Napoca.

La Kultura Centro Esperantista en La Chaux de Fonds organizas renkontojn kaj kursojn. Inf. KCE, Pk 779, CH- 2301 La Chaux de Fonds, Svisio.

Ankaù la esperantista staĝejo "La Kvinpetalo" proponas diversajn kursojn kaj renkontojn. Petu la programon: F-86410 Bouresse.

Kaj ne forgesu, ke la Esperanto-Domo Grésillon estos malfermita de la 23-a de junio ĝis la 2-a de septembro. Petu la programon al : Esperanto-domo, Informservo, 17 rue Cesar Franck, 44240- La Chapelle-sur-Erdre, Francio.

NOVAJ ELDONAĴOJ- Finfine aperis la tiom atendita vortaro Franca-Esperanta. Ĝi estis solene prezentita en Parizo, en Forum de Halles.

Okaze de tiu apero la esperanto-centro de Angers aranĝis ekspozicion titolitan "Esperanto kaj la franca literaturo".

Alia grava eldonaĵo ĵus aperis. SAT-AMIKARO publikigis malgrandan franclingvan broŝuron:" L'Europe: au rebours du bon sens?". Nepre legenda kaj uzenda por la informado, same kiel la antaùa grava libreto , ankaù verkita de Claude Piron "Communication linguistique". Konvinkajn argumentojn vi trovos ankaù en la broŝuro "L'esperanto ça marche" eldonita de UFE.

Ambaù organizoj, UFE kaj SAT-Amikaro povas disponigi al vi seriojn da interesaj afiŝetoj por viaj ekspozicioj.

TELEFAKS-LISTO- La esperantistoj, kiuj posedas telefakson povas faksi al D.M. Weidmann, Svisio, fakso: + 41-1-3835525 siajn personajn indikojn.

EVENTOJ- Tio estas la nomo de la juna, unujara sendependa gazeto pri la Esperanto-Movado. Ĝi aperas dusemajne kaj estas "io alia ol la kutimaj movadaj gazetoj". Adreso: Lingvo-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario.

EN 1994- oni jam anoncis la datojn de la 79-a Universala Kongreso de UEA, de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1994, en Seulo, Koreio.

Tuj poste, de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aùgusto, okazos la Internacia Junulara Kongreso.

MIKAEL-MONTO

LA ENIGMO DE LA DRAKO

Forŝiraĵo inter ĉielo kaj tero: tio estas fulmo; sed ankaŭ potenca ligo, kies intensecon nenio ajn povas egali. Mikaelmonto estas eble la ununura loko en la mondo, kie povas ekŝpruci la dia lumo, precize sur la interrenkonta punkto de ambaŭ ĉefanĝelo kaj drako. En la abatejo malmultas la figuroj de la krucumito dum abundas tiuj de intime kunligataj Mikaelo kaj Maria.

Se ni kontemplas la Monton de la Mirindaĵoj, plej okulfrapas ĝia fiera izoliĝo meze de sabla ebenaĵo. Ĉu temas pri maro? pri vastaj marĉoj? Ĉu venteroditaj dunoj aŭ terpecoj ronĝitaj de la ĉien ŝaviĝanta maro, likva balanciĝado iren kaj reen ĝis la ventokaresataj altaj herbotigoj? El ĉiuj francaj marbordaj pejzaĝoj la plej stranga nekontesteble estas tiu golfeto proksimume 250 kvadratajn kilometrojn vasta. Tempe de la ekvinoksaj tajdoj en ĝia funelforma ekstremo observeblas ondegoj 15 metrojn altaj. En la daŭro de nur kelkaj horoj tiu senlima ebenaĵo estas surkovrita de dubegriza akvotavolo. En la malflusa horo kun egala rapideco la akvo retiriĝas 12 kilometrojn malproksimen de la marbordo kaj naskas malfacile distingeblan ŝlimejon.

Iam, sur la loko mem de tiu nemezurebla dezerto el sablo etendiĝis densa vasta arbaro, kiu sekve de malaltiĝo dum la IX-a jarcento suferis iom-post-ioman fordetruon kaj marinvadon. Fragile nestabila restas la grundo en tiu golfeto, kiu pli kaj pli sabloŝtopiĝas, ĉar la digo, ligilo inter la Monto kaj la kontinento, konsistigas baron. Meze de tiu dubesenca ebenaĵo super kiu rondoŝvebadas la marbirdoj, nur la Monto sajnas firma. Gi estas rondoforma granitaĵo, eĉ konusforma, kun 900-metra cirkonferenco kaj 50-metra alto ekskluzive de la konstruaĵoj. Sude kaj oriente, jen la vilaĝo; sur la pinto, la abatejaj konstruaĵoj. La remparoj rememorigas pri la fakto,ke ne nur sanktejo ĝi estas, sed en la pasinteco ofte sieĝita kvankam nevenkebla fortreso. Ĉie roko palpeblas. Dum la suprengrimpado abatejen oni preterpasas la paroĥan preĝejon (ĝi nomiĝas Nia-Sinjorino de la Teraltaĵo), kiu entenas nigran virgulinon. Kiu ŝi estas, la misterulino, kies kunesto nepre necesas, por ke sankta Mikaelo povu plenumi sian komision? Estas konate, ke antaŭ la alveno de kristanismo la antikvaj gentoj kultis iajn diinojn, ĉu de la praaj akvoj, ĉu de la patrino-tero. Tiujn enradikiĝintajn kultojn kristanismo transprenis, sed la terajn diinojn ĝi anstataŭis per la Di-patrino, la reĝino de la ĉielo.

Se Mikaelmonto sub danĝero de la maro konsistigas unikaĵon, ĝi tamen ne estas la monto unusola, kiun la homoj dediĉis al la ĉefanĝela kulto. La altaĵoj estas privilegiaj lokoj, por ke plenumiĝu la misteraj interŝanĝoj teraj kaj ĉielaj,t.e. inter la tera kaj ĉiela radifluado. Ne temas pri kapturnaj pintoj, sed prefere pri humilaj montetoj, eĉ teramasoj. Tia elekto simbole evidentigas, ke sankta Mikaelo klopodas esti atingata de la homestaĵoj por enverŝi en ilin la dian lumon. Duobla estas lia rolo: unuflanke al ĉiuj vivuloj li signas la superan lumon; aliflanke, tial, ke tombo estas tumulo, li alkondukas la animojn transen. Li estas la protektanto de la forpasintoj, la kunliganto de la dia inteligenteco kun la homa, la kunfandiganto de la fajroj ĉiela kaj tera. El tio fontas, ke ĉiu loko al li dediĉita devas esti escepta, riĉa je tera magnetismo kaj ĉiela elradiado. Jen la elementoj de ia sankta geografio.

Perfekta ilustraĵo de loko tiaspeca videblas ĉe la tiel-nomata Monte-Gargano. Tie mankas nek grotoj, nek subteraj ejoj. Veran inican

migradon konsistigas kaj la alirvojo kaj la subtera paŝado. Tradicio raportas, ke tie ĉe sunsubiro la pordoj mem fermiĝis kaj same malfermiĝis ĉe sunleviĝo. Tiel la anĝelaro ĉiunokte en la templon desupris por celebri misteran liturgion, kiun nur tre malmultaj homoj rajtis ĉeesti. Gargano-monto orienten rigardanta povas esti konsiderata, kiel la unua fazo de konstrua tutaĵo, kies dua fazo ja estas Mikaelmonto okcidenten sin turnanta. Ambaŭ sanktejoj egalvaloras, samsignifas kaj pluigas unu la alian.

Ni menciu kelkajn priorejojn de Mikaelmonto dependajn. Kvankam duarangaj ili tamen atentindas, ĉar kvazaŭ sur rekta linio ili situas, de Italio ĝis fora okcidento: fine de Kornvalo kaj en malvasta irlanda insuleto (tie la kelta monaĥejo de la sepa jarcento datiĝanta estas enfosita en la roko mem.) Kaj iom pli ol duondistance, en nia arvernia Centra Montaro staras sanktejo samcela, en rekta rilato kun la virgulino. Tiu loko, nome Le Puy-en-Velay, estis kruciĝo de pligrimaj vojoj inter Nord-Eŭropo kaj Mediteraneo. Subtrajte de galla militisto aperas la anĝelo, kio pruvas plian anstataŭigon de antaŭa Lug-kulto per kristana. La tiea vulkano konsistigas ĉeneron el tuta grava vulkano-vico. Necesis do, ke ĉe la pinto gardostaru ia pordisto kapabla bridi la minacantajn terajn fortojn. Tiun sanktejon oni povus analogie titoli "Mikaelmonto sub danĝero de la tero", danĝero foje pli timinda pro la insidema silentado. Ĉe unu flanko de la urbo, desur sia alta soklo Mikaelo kontrolas la subteran mondon, dum ĉe la alia flanko Maria leviĝas por lin subtenadi.

Ni iom revenu al historiaj konsideroj. Tre frue komenciĝas la mikaela kulto en okcidento pro la koptaj monaĥoj, kiuj dum la VIII-a jarcento estis devigataj forfuĝi el Egiptio kaj rifuĝi en niajn regionojn. Ĉiun dek-duan tagon la Koptoj kutimis soleni la ĉefanĝelon. La izraela komunumo siavice lin perceptas, kiel la unuarangan princon, la pontifikon en la ĉiela Jerusalemo celebrantan. Al li respektoplene ankaŭ omaĝas la islamanoj.

Per sia luma vizaĝo, iel simila al tiu de Mitrao (la potenca rivalo de Kristo tra la tuta romia imperio), Mikaelo estas la atestanto de vero kaj justo. Lia bildo aperas ne nur en lia konstanta luktado kontraŭ la drako, sed ankaŭ okaze de la pesado de la animoj, dum kiu li foje, pro karitato, ĵetas sian glavon sur la pesilteleron por ekvilibri la klopodojn de Satano, strebanta, ke la alia superpezu.

Ĉar Mikaelo estas konstante venerata sur la montoj al Lug dediĉitaj, ni reparolu pri ĉi lasta. Lug estas la heroo de la lumo, sed de la lumo nereala. Kontraŭ la fortoj de la mallumo li batalas, sed de ia mallumo dubesenca. La irlanda fabelaro lin titolas per kromnomoj, kiuj enfokusigas la variecon de liaj funkcioj kaj igas lin unuaranga diaĵo. Li estas ne nur la "multfaka faristo", sed ankaŭ "la bateganto", "la longmanulo", "la brileganto kiel la suno". Liaj atributoj estas la korvo (ni rememoru le helenan Apolonon), kaj la lanco, magia armilo el la nordo de la mondo veninta. Neniam supervenkita ĝi estas. Plej alta gvidanto de la panteona armeo kontraŭ la gigantoj, kvankam ne estas li la praa dio, ĉiujn aliajn li superas ne laŭ la leĝo, sed pro sia efikopovo. Li fundamente simbolas la superajn nivelojn de la homaro atingotajn, por ke povu unuiĝi la mondoj spirita kaj materia. Oni scias, ke la keltaj druidoj templojn ne konstruis, ĉar ja aŭtenta templo estas la naturo. Tutcerte ili taksis alcela loko la teraltaĵon en Normandujo, kie ambaŭ mondoj ĉiela kaj tera ekrilatiĝas Ne mirige do, ke kulto al la ĉefanĝelo tie ekŝprucis, sub la influo de la spiritaj elanoj de la ermitoj.

Neeblas, ke oni konceptu sanktan Mikaelon disigita de la drako de la profundaĵoj, ĉar ambaŭ kunludas dramon, kies fino neniam venos. En ĉiukulturaj tradicioj la drako signas la plej teruran forton ene de la tero enfermitan. Fabela bestego; imitanto de la serpento, kies formojn ĝi troigas, tio klarigas, ke tiuj ĉi du estas ofte konfuzataj. La drako estas integrita en la imaga

homstoko kaj entutigas per si mem ĉiujn ajn fantasmojn kaj impulsojn, ĉiujn terurojn, kies cikatroj stampiĝis en la memoro, ĉiujn dubesencajn vivsituaciojn, kiuj blinde disvolviĝadis meze de obstakloj venkeblaj nur kondiĉe, ke ili estu ĉirkaùirataj. Du skoloj prezentas vidpunktojn unuavide malajn, sed post pripenso sinkompletigajn.

Laù la raciemuloj la teruronaska bildo de la drako estas nura rememoro de la praa terurego, kiun inspiris antaùdiluvaj specimenoj, nome tiuj egproporciaj rampuloj, kies bildo kuŝas kvazaù netuŝita en la nekonscia fundfundo sub halucinaj formoj. La rampula irmaniero aperas en ĉiu draka figuro, kaj en oriento, kaj en okcidento.. Temas pri piedprovizitaj rampuloj kaj egajn proporciojn alprenas ankaù la piedoj. En la kapo estas entenata la tuta detruopovo: fulmoĵetaj estas la okuloj, flameliga la lango, fetora la spiraĵo, dum la dentoj piste frakasas kaj voradas. Kruda instinkto, vivluktado, furiozo, ĉio tio kristaliĝas en la bildo de la praa besto, fariĝinta fantasmokrea objekto.

Tamen la filozofoj kaj teologoj opinias, ke la draka bildo estas la rezulto de longa prilaborado, de pure intelekta konstru-procezo celanta al konkretigo de ĉio, kio estas, ĉu malpermesita, ĉu evitenda: t.e. la malbono, la malbelo, la mallumo. Dank'al la drako la homestaĵo povas elŝiri el sia psiko la sorĉoformajn impulsojn, kiuj ĝin obsede sieĝas. Tute ne gravas pri la formo de la drako: la rampula ŝajno ofte estas nur metafora. Resume: iliaopinie abstraktaj pensoj konkretiĝas en la bildo de la drako, dum por la unuaj (la raciemuloj) temas pri konkretaj formoj, enmemorigitaj, sed misformitaj, kiuj estigas fantasmojn

Kio ajn estu, samkiel la drako rilatiĝas kun sankta Mikaelo, same la serpento kun Dio. Se ni konsentas pri la ekvivalenteco "drako-serpento", ni turnu nin al la libro de Genezo. En tiu teksto la serpento ankoraù ne loĝas en la teraj profundaĵoj. Ĝi estas rimarkinda pro sia ruzemo, kiu ebligas por ĝi transpaŝon de la unua plano de la Kreinto. Notindas ke nur post la transpaŝo la serpento fariĝas tera besto kaj rampulo. En astronomio kaj astrologio la drako ligiĝas kun la eklipsaj fenomenoj, do kun ĉio malluma. Ne mirige, ke en la legendoj oni ĝin renkontas, kiel gardiston de la trezoroj kaŝitaj en la teraj kavaĵoj. Sed la drako ne ĉiam aperas sub la negativa vesto, per kiu oni ĝin kovras por fari el ĝi la plej teruran bildon de Satano, tute male. La drako de la profundaĵoj estas plejunue la bildo de la homa nekonscio. Ĉion ĝi entenas. Se la drako ĉiam antaùas civilizan lum-heroon, la kialo estaş ĉar ĝi signas la praan potencon ankoraù ne diferencigitan. Ĝi estas la serpento de la Genezo, sed antaù la tiel-nomita prapeko. Tial la drako ofte sin prezentas sub dubesencaj formoj, ĉu androginaj, ĉu sendube inaj. Tio estas la universala patrino, la diino de la prao. Tiun karakterizon ni trovas en Maluzino, la serpenta feino, personigo de dia ento akva kaj tera. Ne sataneca estaĵo estas Meluzino; tamen unu el la plej trafaj ekzemploj de la drako de la profundaĵoj laù la okcidenta pensmaniero.

Nepre necesa estas la drako, por ke la mondo pluvivu. Ne ĝi estas kontraùbatalinda, sed ĝiaj misuzoj kaj troigoj. Sur la Monto, sankta Mikaelo ne mortigas sian kontraùulon. En la reciproka batalo gravas la gesto. Se la drako ne estas la esenca malbono; se konsistigas la malbonon nur malekvilibro liaprofite, necesas nur la restarigo de tiu rompita ekvilibro. El tio konsistas la misio de la ĉefanĝelo, sub signo de absolute pura karitato. Simbola estas la lukto. La fulmo estas la manifestiĝo de tiu interŝanĝo inter du polusecoj malsamsignaj. Eĉ pli: la drako estas nekontestebla ero de la anĝela personeco mem. Se unu fojon por ĉiam ni forigos jenajn trosimpligajn nociojn: blanko, lumo, belo egalvaloras bonon, dum nigro kaj malbelo estas ekvivalentoj de malbono; se ni konsentos disigi tiujn erarigajn kunmetitaĵojn, ni ekkomprenos la veran signifon de sinkompletigaj valoroj.

Ş. Boniol

De ŝminko al drinko

Enkonduko: la valoro de etimologiaj studoj- Unu el la plej informriĉaj Esperanto-konsultlibroj lastatempe eldonitaj, estas "Etimologia Vortaro de Esperanto" (EVE), kompilita de Ebbe Vilborg. Jam aperis volumoj 1 (A-D) kaj 2 (E-Ĵ) en 1989 kaj 1991 respektive. Oni povas spuri tre interesajn historiojn pri Esperantaj vortoj kaj trovi rilatojn inter pluraj radikoj, kiuj en la nunaj formoj tre malsamas laŭ formo kaj signifo. En tiu ĉi artikolo mi pritraktos la etimologion de la vorto "alkoholo" kaj prezentos kulturhistoriajn donitaĵojn, kiuj montras, kiel ĝi rilatas al speco de ŝminko por la okuloj.

Internacieco de la vorto "alkoholo"- Komparo de la ekvivalentoj de "alkoholo" en aliaj lingvoj indikas, ke ĝi havas pli-malpli la saman formon en pluraj lingvoj.

franca: alcool	rusa: alkogol'
itala: alcool	kimra: alcohol
hispana: alcohol	hungara: alkohol
portugala: álcool	finna: alkoholi
germana: alkohol	turka: alköl
angla: alcohol	japana: arukôru

Similaj formoj estas troveblaj ankaŭ en aliaj planlingvoj, eĉ tiuj, kiuj ne estas klasifitaj kiel naturalismaj; jen du ekzemploj:

Volapuko (reformita): lalkohol
Suma (apriora) : alko

Difinoj de "alkoholo" en Esperantaj vortaroj- Estas utile kompari ankaŭ difinojn de "alkoholo" en diversaj Esperantaj vortaroj por ekscii, kiel leksikografiaj normoj evoluis en periodo iom pli ol duonjarcenta.

1909-1910 (Boirac): Fluaĵo eltirita el la vino.
1910 (Verax): Tre volatila likvaĵo ricevebla per distilado de la vino.
1922 (Kabe): Esenca parto de brandoj, vinoj, likvoroj (ĥem. etila alkoholo)
1934 (Plena Vortaro): C_2H_6O Fluaĵo ricevita el distilado de vino, greno kaj diversaj fermentitaĵoj.
1970 (Plena Ilustrita Vortaro)-
1. Organika substanco kun OH-grupo
2. Likvo akirita per distilado de fermentintaj sukerhavaj substancoj, kiel greno, vinberoj, ktp; = etilalkoholo, C_2H_5OH.

La deveno de la vorto "alkoholo"- "Alkoholo" eniris la eŭropajn lingvojn tra la oldhispana lingvo, kiu siavice ricevis ĝin de la araba al-kuĥl "okulŝminka pulvoro, kolirio" kaj ankaŭ "pulvorigita antimono". En la mezepoka farmacia latino, "alkoholo" akiris la sencon "la plej subtila parto de io", kiu evoluis de la primara signifo de al-kuĥl "subtila pulvoro". En la araba vorto, al estas la difina artikolo, dum kuĥl estas la nomo de la kemia elemento antimono (Sb). Antaŭ ol priskribi la uzon de al-kuĥl fare de historiaj kaj nuntempaj popoloj en la Proksima Oriento kaj en Nordafriko, estas necese informiĝi pri la origino ankaŭ de la vorto "antimono".

La etimologio de "antimono"- Malgraŭ sia kemia simbolo Sb (de la latina stibium), la elemento estas internacie konata laŭ la nomo "antimono". Ĝi estas arĝentece blanka, kristala metalo, uzata aktuale kiel konsistaĵo de alojoj en industrio kaj ankaŭ por preparado de medikamentoj. La mezepoka latina vorto antimonium probable havas sian originon en la samsignifa araba vorto al-itmid. Same kiel al-kuĥl, ĝi estis prenita en la latinan kune kun la difina artikolo al. Al-itmid estas spurebla al la helena substantivo stíμμi aŭ stíbi (antimona nigraĵo aŭ ŝminko). La helenoj akiris sian vorton de la egipta nomo de la sama substanco, ŝt(i)m.

Kosmetika uzo de antimono- La araba vorto kuĥl devenas de la mezopotamia nomo de okulfarbo, guĥlu, kutime tradukita per "stibia pulvoro". Surbaze de restaĵoj en egiptaj tomboj, arkeologoj povas rekonstrui la procedojn de preparado kaj uzado de okulŝminkoj en la antikva mondo. Unue oleeca pudro estas akirita per nekompleta karbonigado de diversaj grasaj substancoj, kaj al ĝi estas aldonita antimono. Plej verŝajne la antikvuloj ne konis ĝin en pura

metala formo, do ili utiligis ĝian plej gravan ercon, stibniton (Sb_2S_3 , antimona trisulfido). Aldonebla laŭvole estas ankaŭ diversaj parfumitaj esencoj. La mineralaj ingredientoj estas subtile muelitaj sur paletro aŭ plata ŝtono kaj poste miksitaj kun akvo aŭ iu gumo solvebla en akvo, por ke la maso akiru la konsiston de pasto. Tiun miksaĵon oni ŝmiras aŭ frotas sur la palpebrojn, okulharojn kaj brovojn per fingro aŭ per la finaĵo de malgranda bastoneto el ligno, osto aŭ eburo, kiu estas antaŭe malsekigita.

Uzo de antimono kiel kolirio- La nomo de la ŝtonaj paletroj, kiujn la egiptoj uzis por mueli la okulfarbajn ingredientojn, estas parenca al la radiko signifanta "protekti", ĉar tiuj substancoj estis uzataj origine por preventi okulmalsanojn, grandan plagon en la Proksima Oriento ankaŭ nuntempe. Estas facile sekvi la laŭgradan ŝanĝon, de okulfarbo de vera protektilo kontraŭ muŝoj kaj infektado, al unu el la plej karakterizaj kosmetikaĵoj de la antikveco. Iom post iom la insektforpelantaj proprecoj de la ingredientoj malpliiĝis, kaj la koloroj akiris pli da graveco. En la Predinastia Periodo en Egiptio viroj same kiel virinoj ŝmiris verdan farbon ĉirkaŭ la okuloj, ĉar ĝi servis por ensorbi iom de la sunbrilo. En la Dinastiaj Tempoj la plej ofta koloro estis malhela grizo. Aliloke la asirianoj metis nigran ŝminkon sur siajn okulojn.

La Esperanta neologismo "koholo"- Jam ekzistas vorto en Esperanto por la ŝminko priskribita ĉi-supre. Ĝi estas "koholo", enkondukita de Jean Ribillard en la jaro 1963. La sekva citaĵo temas pri fianĉino tuj antaŭ la geedziĝ-ceremonio, kiu estas ŝminkata fare de siaj kunulinoj. La evento okazas en Nord-Afriko:

"Kiom da intimaj sentoj en senparola konfeso ellasas la nigraj okuloj kohole farbitaj!" (Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud, paĝo 40)


Sur paĝo 142 Ribillard glosas "koholo" jene: " pulvoro el antimono aŭ bruligitaj migdalŝeloj, per kiu orientaj virinoj ŝminkas la palpebrojn".

Semantika transformiĝo kaj disvastiĝo de la vorto "alkoholo".

La renesancaj alkemiistoj, kaj precipe Paracelsus (1493-1541), en la 16-a jc. donis al la araba vorto al-khûl pli vastan signifon; ili uzis ĝin por produktaĵoj rezultantaj el maksimuma purigado aŭ rafinado (pulvoroj) kaj maksimuma distilado (likvoj). La unua tiuspeca likvo estis vina spirito, t.e. alkoholo. Tiumaniere disvastiĝis tra la mondo tiu fakvorto de la alkemiistoj.

Eblas spekulativi, ĉu Ribillard kreis la nomon de la ŝminko, "koholo", surbaze de la jam ekzistanta substantivo "alkoholo". Ĉu li sciis la historian rilaton inter la du substancoj, aŭ ĉu li simple formis "koholo" surbaze de la franca etimo "kohol"? Ĉiuokaze, en Esperanto la forigo de la unua silabo de "alkoholo" montras, kiel ŝminko evoluis al drinko.

Bernard GOLDEN



KAIRO-MUZEO

Ŝminko-kulero

EŬROPO KONKERAS LA MONDON

Unue , mi devas difini la vorton "Eùropo" por tiu rakonto. Kiam la romia imperio disfalis, ĝi jam estis dividita en du partoj, la okcidenta parto, kie oni parolis latine kaj kies ĉefurbo estis Romo, kaj lasttempe Raveno, kaj la orienta parto, kie oni parolis greke, kaj kies ĉefurbo estis Bizanco. La okcidenta parto ĉesis ekzisti, kiam Odoakro resendis la insignojn al Bizanco, sed poste, dank'al la frankaj reĝoj, ĝi estis restarigita. La urbo Romo estis donita al la papo, kiu reciproke faris Karlon la Grandan imperiestro en la 800-a jaro de la kristana erao. Dum la orienta parto restis imperio ĝis 1461 (post la konkero de Bizanco fare de la Turkoj en 1453), la okcidenta parto evoluis en Sankta Ĝermana Imperio, kiu daùre rilatis kun la papo kaj pli malpli uzis la latinan lingvon, dum la orienta parto de la imperio daùre uzis la grekan lingvon, kiu, slavigita, fariĝis la lingvo de la orienta parto de la geografia Eùropo. Kiam mi parolos pri "Eùropo" en tiu rakonto, temos pri la okcidenta parto de Eùropo, kie la homoj estis katolikoj kaj la klera lingvo estis la latina.

Dum pluraj jarcentoj, inter la 9-a kaj la 14-a, la Eùropanoj estis unuarange katolikoj, kaj la papo havis gravan rolon eĉ kiam formiĝis la sufiĉe gravaj reĝlandoj Anglio kaj Francio. La ĝermana Eùropo luktis kontraù la invadantoj: la Araboj, kiuj venis de la sudo, kaj la Vikingoj, kiuj venis de la nordo. Poste la Eùropaj kristanoj batalis kontraù la Turkoj, por libere pilmigri al Jerusalemo kaj instalis kristanan reĝlandon en tiu parto de Azio. La krucmilitiroj daùris de la 11-a ĝis la 13-a jarcento La 14-a jarcento estis tiu de la milito inter la tiam plej gravaj reĝlandoj: Anglio kaj Francio, kaj oni ne forgesu la gravan pestan epidemion, kiu mortigis multajn Eùropanojn.

En tiu mezepoka okcidenta Eùropo, kiam elvolviĝis komerco, ĝi okazis tra la Mediteraneo kaj la ĉefaj havenoj estis Venecio kaj Ĝenovo, kiuj komercis kun la proksima oriento, de kie, la araboj trapasigis la komercaĵojn al Azio. Dank'al la veneciano Marko Polo, oni sciis, ke ekzistas, orienté, la ĉina civilizacio tiam estrita de la Mongola dinastio. Norde ekzistis komerco, sed nur inter diversaj partoj de la norda kaj orienta Eùropo, kaj la vojaĝo de Eriko la Ruĝa al okcidentaj bordoj restis sen postsekvo.

La ĝermanaj konkeroj estis detruintaj la klerajn akirojn de la romianoj. La katolika eklezio opiniis la konojn de la antikvuloj malpiaj, por ne diri Diablaj, kaj dum pluraj jarcentoj, nur kelkaj homoj, precipe en monaĥejoj, konservis tekstojn pli malpli bone komprenitajn. Kiam la Araboj konkeris la sudon de Mediteraneo kaj instaliĝis en la nuna Hispanio, okazis renovigo de la kulturo. Tre ofte la antikvaj konoj de la antikvuloj atingis la katolikan mondon pere de la Araboj. Eĉ iuj Aristotelon kromnomis per "la Arabo". Speciale en Hispanio, kie kunvivis kristanoj, judoj kaj islamanoj, la scienco elvolviĝis. Matematiko multe progresis (oni ne forgesu, ke nia sistemo por la skribado de la nombroj estas araba kun la "nulo", kiu estas hinda eltrovaĵo) kaj ke la araboj eltrovis "algebron".

Ek de la 15-a jarcento oni alimaniere komprenas la mondon- Kiam Tomaso de Akvino estis aranĝinta kompromison inter la katolika kredo kaj la Aristotela filozofio, oni opiniis, ke oni scias ĉion, ke la ,nekonataĵoj estas nekoneblaj misteroj kaŝitaj de Dio kaj ne serĉindaj. Kiam la papo estis tre potenca, la eklezio trudis al tiu katolika mondo, iun negativan sintenon rilate al la novaĵoj. Kontraùe, en la 15-a jarcento kiam la papoj kondutis, kiel Italaj regnestroj, oni komencis opinii, ke la tiamaj misteroj, estas simple ignorataj veroj, kiujn indas malkovri.

Ekzemple, laù la malnova sintenado, oni opiniis, ke la okcidenta oceano estas la oceano de la Diablo, kiun Dio malpermesas viziti, kontraùe, laù la nova scivolemo, oni sin demandas kio estas inter la okcidenta Eùropo kaj la Indoj.

Alia karaktero de tiu evoluo de la penso, oni ne plu apartigis la konojn de la praktiko. Ekzemple, oni instruis aritmetikon por ĝia uzo en la komerco, kaj la algebro de la Araboj estos de tiam praktike uzata. La unua libro pri komerca aritmetiko aperis en 1478 kaj la grava verko de Chuquet pri la ekvacioj de la dua grado (sen uzo de geometrio) datumas de 1484.

La ekonomia kaj socia situacio- Post la militoj kaj epidemioj de la 14-a jarcento, la populacio kreskas kaj speciale en la urboj. En tiu tempo unu homo inter sep loĝas en urbo kaj jam estas 242 urboj kun pli ol 10 000 enloĝantoj. Industrio, komerco speciale kreskas. En la plej grandaj reĝolandoj, la reĝoj disponas ĉiamajn armeojn kaj artilerion, kiu ebligas la majstrecon de la landoj kaj la elvolviĝon de moderna ŝtato. Speciale menciinda estas la venko de la Turkoj en Bizanco (1453). Pro tiu konkero la komerco kun oriento, Mediteraneo kaj Nigra Maro fariĝis neebla aù malfacila. Venecio batalis kontraù la Turkoj por daùre komerci tra Mediteraneo, sed Ĝenovo decidis komerci per la okcidenta vojo kaj instalis kontorojn en Sevilo kaj Lisbono. Per tiuj diversaj influoj, la navigado fariĝos al okcidento.

Inventoj kaj perfektiĝoj- Oni konis la okulvitrojn ekde la 13-a jarcento, sed en la 15-a oni sukcesis fiksi tiujn okulvitrojn sur la vizaĝon kaj tio liberigis la manojn. Oni diris, ke dank'al la okulvitroj, la intelekta vivo de la homoj plilongiĝis je 15 jaroj.

Oni perfektigis la fabrikadon de papero dank'al la uzo de la naturaj fortoj, per uzo de akvaj kaj ventaj miksiloj. Oni eltrovis la presadon: 1434: unuaj moveblaj; 1450-1456: presado de la Biblio; 1482: presado de la Eùklida geometrio en Venecio; 1486: presado en Parizo de Leteroj de Cicerono. En 1491 estas presejo en 236 urboj de Eùropo.

Oni konis la mekanikajn horloĝojn en Germanio ekde la 13-a jarcento, sed en la 15-a per la uzo de risorta motoro oni povas multe pli facile uzi tiujn horloĝojn. De tiam la homoj fariĝos akurataj; estas granda ŝanĝo en ilia konduto.

Oni ankaù perfektigis la produkton de fero per la eltrovo de la altforno, kiu donas gisajn kuglegojn. Kaj oni ankaù perfektigis la minejojn per la uzo de horizontalaj galerioj.

Pli ĝenerale oni povas diri, pro tiu ligo inter la scienco kaj la praktiko, ke aperas nova profesio: la inĝeniero. Oni strebas ne nur al kono dela mondo , sed ankaù al respondo al la bezonoj de la diversaj profesioj.

Speciala evoluo de la ŝipoj- Ekzistis ŝipoj por la milito aù por transporti pezajn varojn, tiel estis ekzemple la galeroj. En Portugalio, en la 15-a jarcento, oni eltrovis la karavelojn. Tiuj novaj ŝipoj estis pli malgrandaj, 20m longaj kaj 8m larĝaj kun 20 maristoj. La tabuloj de la ŝelo ne plu parte kovris unu la alian sed estis fiksitaj laù la bordoj kaj tio malpezigis la ŝipojn. Ili malprofunde eniris la akvon, kaj tio ebligis navigadon proksime de la landbordoj kaj la enakva volumeno estis ĝis 12foje pli malgranda, kaj tio ebligis pli grandan rapidecon.

Speciala situacio de la geografio- En 1375 la kataluna atlaso, kiu estis desegnita laù la rakontoj de Marko Polo aperis. En 1410 la franco Pierre d'Ailly verkis libron "Imago mundi", en kiu li priskribis la mondon laù Aristotelo, Ptolemeo sed ankaù laù Plinio kaj Sankta Aùgusteno. Cetere en tiu verko estis eraroj, kiuj kuraĝigis Kolombon en sia utopia eraro. En tiu epoko oni tradukis latine la geografion de Ptolemeo (traduko en 1409 fare de Jakobus Angelus kaj presita eldonado en 1475 sen mapoj kaj en 1478 kun mapoj gravuritaj sur kupro). Antaùe ekzistis "portulanoj", kiuj donis informojn por navigi de iu haveno al la alia, sed dank'al la geografio de Ptolemeo oni disponas

pri novaj koordinatoj, kiuj ebligas la starigon de veraj mapoj. Alidirite, en tiu epoko oni preferas al la tradicio la malkovron per observado kaj mezuroj. Oni perfektigis la kompason kaj oni uzis bastonon (nomata bastono de Jakobo) por mezuri la latitudon pere de la suno. Sed ĉar la suno ne estas ĉiam je la sama ĉiela latitudo, necesis uzi astronomiajn tabelojn. Ankaù en Portugalio la princo Henriko kromnomata "la naviganto (kvankam li neniam navigis!) kreis lernejon pri desegnado de mapoj.

Unuaj esploroj en Atlantiko- La Portugaloj serĉis terojn por kultivado kaj militis kontraù Maroko. Sed survoje ili malkovris la insulojn Madero (1418) kaj Acoroj (1432). Sur tiuj insuloj instaliĝis kultivantoj. Sed samtempe aliaj kultivantoj iris pli suden. En 1434 la maristoj preterpasis la kabon "Bajador", kiun oni taksis la plej suda parto de maroka maro. De tiam, dank'al la novaj ŝipoj, oni decidis daùrigi kaj oni malkovris la okcidentajn bordojn de Afriko: en 1445 Senegalion kaj insulojn de la Verda Kabo, en 1446 Sieraleonon. En tiuj varmaj regionoj, oni ne instaliĝis sed komercis pri oro kaj nigraj sklavoj. Ekde la mezo de la jarcento la Portugaloj serĉis vojon por iri al la Indoj pri kiuj parolis Marko Polo, tiel ili iom post iom rondiris ĉirkaù Afriko. En 1471 ili atingis ekvatoron, en 1482 oni navigis antaù la nuna Angolo kaj en 1487 Bartolomeo Diaz vojaĝis ĝis la kabo de la tempestoj, kiun li preterpasis en 1488 kaj la reĝo de Portugalio kromnomis tiun kabon: kabo de la Bona Espero. Tiam Kolombo estis en Portugalio kaj proponis okcidentan vojon por iri al la Indoj, sed la Portugaloj opiniis tiun kredon fantazia, kaj daùre sekvis la afrikan vojon. Tiel en 1498 Vasko de Gama atingis Kalikaton en Hindio. Poste la Portugaloj atingos Malakon kaj Kantonon en Ĉinio. Sed per tiu orienta vojo al "Indoj", la Portugaloj precipe serĉis havenojn por komerci, sed tute ne konkeris teritoriojn.

La vojaĝoj de Kristoforo Kolombo- Kristoforo Kolombo opiniis, ke oni povas atingi la "Indojn" navigante okcidenten. Li unue proponis tiun vojaĝon al la reĝino Izabela de Kastilio en 1486, kiam li instaliĝis en Hispanio post naùjara restado en Portugalio. Sed la reĝino ne akceptis la proponon de Kolombo. Tial en 1488 li proponis sian planon al la reĝo de Portugalio Johano la 2-a, kiu emfazis pri la utileco de tia perŝipa vojo al tiuj landoj. Sed la plano de Kolombo estis rifuzata. Tiam la frato de Kolombo, Bartolomeo, proponis la saman planon al la reĝoj de Anglio, Henriko la 7-a, kaj de Francio, Karlo la 8-a. Ambaù rifuzis la proponon.

Tiam Kristoforo rekomencas sian peton al la reĝoj de Hispanio. Al Ferdinando li montras, ke per tia vojaĝo oni povas akiri multe da oro, kaj al Izabela li klarigas, ke oni povus kristanigi la indianojn. En 1491 komisiono estas starigita. Kolombo sekvas la gereĝojn ĉien en Hispanio, li uzas siajn rilatojn kun la konfesanto de la reĝino kaj fine, kiam la reĝoj "katolikaj" estis venkintaj la Maùrojn, en 1492, la propono de Kolombo estis akceptita.

Oni devigis la loĝantojn de "Palos de Moguer", haveno kiu nun ne plu estas uzebla en la golfo de Kadizo, kiuj fiŝkaptis kontraùleĝe, ekipi, punpage, tri karavelojn. La reĝo anoncis, ke la homoj, kiuj foriros kun Kolombo ne estos persekutataj de la juĝistoj ĝis la reveno. Tiel Kolombo disponis tri karavelojn, kies maristoj estis persekutataj de justico. Tiuj karaveloj havis nomojn de prostituistinoj: "La Pinta": la ŝminkita; "La Nina": la malgranda, "La Gallega": la Galegino. Sed poste oni nomis la plej grandan karavelon, kiu estis La Gallega, "Sankta Maria". La unua vojaĝo komenciĝis la 3-an de aùgusto 1492, kaj post halto en Kanarioj por ripari rudron, la vera vojaĝo komenciĝis nur la 6-an de septembro. La maristoj opiniis la vojaĝon longa kaj minacis Kolombon, sed feliĉe la 12-an de oktobro ili trovis iun teron.

(daùrigota) F. BOYET

MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Sekvo)

(Napoleono revenis Francion, kaj S-ro Morel, subtenanto de Edmond Dantes, triumfas. S-ro de Villefort, akuzinto de Dantes, tamen konservas sian oficon. Sed tio daùros nur Cent Tagojn.)

S-ro Morrel imagis, ke li trovos Villefort senkuraĝigita; li trovis lin, kiel ĉe ilia renkontiĝo ses semajnojn antaùe, kun glacieca ĝentilo, tiu plej obstina baro, kiu tenas altrangulon distance de vulgara homo. Li enpaŝis en la laborĉambron de Villefort, certa, ke la juĝisto tuj ektremos; sed la malo okazis. Morrel tute konfuziĝis kaj emociiĝis antaù la demandema fierulo, kiu lin atendis kun siaj kubutoj apogitaj sur la skribotablo. Li haltis ĉe la pordo. Villefort rigardis lin kvazaù li apenaù lin rekonus. Fine, post kelkaj sekundoj da observo kaj silento, dum kiuj la digna ŝipekipisto turnis kaj returnis sian ĉapelon en la manoj, li demandis:" Sinjoro Morrel, ĉu ne?"- "Ĝuste", respondis la ŝipekipisto." Bonvolu alproksimiĝi", diris la juĝisto kun protekta mansigno," "kaj diru al mi la kaùzon de via vizito, kiu min honoras"- "Ĉu vi ne jam scias la kaùzon, sinjoro?" demandis Morrel." Absolute ne; sed malgraù tio, kredu, ke mi pretas fari por vi servon se dependas nur de mi, sinjoro."- "Dependas ĝuste de vi, sinjoro", diris Morrel. "Klarigu nur, tiukaze"- "Sinjoro", daùrigis la ŝipekipisto pli kaj pli retrovante sian memfidon kaj cetere fortigita de la justo de sia postulo kaj la forto de sia opinio," vi memoras, ke, kelkajn tagojn antaù la ekscio pri la surlandiĝo de lia Imperiestra Majesto, mi venis al vi por peti vian indulgon koncerne kompatindan junulon, mariston subkapitanon sur mia brigo; li estis akuzita, vi ja tion ne forgesis kiel rilatanto kun la Imperiestro en Elbo; tiuj rilatoj, kiuj tiam estis krimo, estas nun granda merito. Vi tiam servis Ludovikon XVIII-an sendube kiel lojalulo; tio estis via devo. Sed nun vi servas Napoleonon kaj devas lin protekti refoje laù la postuloj de via devo. Tial, mi demandas al vi, kio okazis al mia maristo?". Kun granda peno Villefort sin regis kaj demandis:" La nomon de tiu viro? Bonvolu ĝin memorigi al mi"-" Edmondo Dantes". Evidente Villefort preferus elporti pistolpafon el distanco de dudek-kvin paŝoj ol aùdi la prononcon de tiu nomo; li tamen eĉ ne kunŝovis la brovojn." "Dantes? Vi diris Edmond Dantes, ĉu ne ?"-" Jes, sinjoro.". Tiam Villefort prenis el fako najbara pezan registron, ĝin malfermis, kuris al tablo, de tiu tablo transiris al aktujo kaj sin returninte al la ŝipekipisto demandis al li kun plej senafekta mieno:" Ĉu vi estas certa, ke vi ne eraras, sinjoro?" Se Morrel estus pli sagaca aù pli bone instruita rilate tiun aferon, li mirus pri tio, ke la vicprokuroro mem konsentas pritrakti aferon fremdan al lia ofico kaj li demandus al si, kial Villefort ne sendas lin al la karcero-registrejo, al la koncerna guberniestro, al la departementa prefekto. Sed Morrel, kiu estis unue serĉinta signon de timo ĉe Villefort, vidis nun en li, tra lia ŝajniga trankvilo, nur ĝentilan bonvolon. Villefort sciis manovri. " Ne sinjoro" respondis Morrel, "mi ne eraras; cetere de dek jaroj mi konas la kompatindan knabon; la kvar lastajn li pasigis en mia servo. Mi venis, ĉu vi ne memoras? antaù precize ses semajnoj, kaj petis vin esti humana, kiel mi venas denove hodiaù kaj petas, ke vi estu justa; vi cetere sufiĉe malbone akceptis min kaj respondis, kiel malkontentulo. Nu! en tiu tempo la rojalistoj ne estis dolĉanimaj al la bonapartistoj!"- "Sinjoro," respondis Villefort kun siaj kutimaj lerto kaj oratoreco," mi estis rojalisto ĉar mi kredis, ke la Burbonanoj estas ne nur laùleĝaj heredintoj de l'trono, sed ankaù elektitoj de la nacio; tamen la mirakla reveno, kiun ni ĵuse travivis estas pruvo, ke mi eraris. La genio napoleona venkis; monarko laùleĝa estas la monarko amata."- "Brave!" ekkriis

Morrel kun sia bona senkaŝa mieno; " mi ĝojas, ke vi tiel parolas al mi, kaj per tio mi aùguras por Edmond bonan sorton".- "Atendu", diris Villefort foliumante plian registron; "nun mi scias; estas maristo, kiu edziĝis kun katalunino, ĉu ne? Ho, jes; nun mi memoras; la afero estis tre grava".- "Kial do?"- "Vi scias, ke li estis konduk-ata el mia domo en karceron de la juĝejo, ĉu ne?".- "Jes, kaj poste?"- "Nu, mi sendis mian raporton al Parizo kune kun la paperoj, kiujn oni trovis ĉe li. Estis ja mia devo, ĉu ne? Nu, ok tagojn post lia aresto li estis forrabita"- "Ĉu forrabita?" ekkriis Morrel; sed kion oni do faris el la kompatind-ulo?"- "Ho, trankviliĝu. Oni verŝajne lin transportis al Fenestrelles, Pignerol, aù al la insuloj Sankta-Margareta, por lin "forkonduki", kiel oni diras fakesprime; sed iun belan matenon vi lin revidos revenantan por estri denove sian ŝipon."- "Li venu kiam li volos; lia posteno daùre atendas lin. Sed kial do li ankoraù ne revenis. Ŝajnas al mi, ke la bonapartista juĝopovo plej unue devus liberigi tiujn, kiujn la rojalista reĝimo enkarcerigis, ĉu ne?"- "Ne kulpigu tiel facilanime, kara sinjoro Morrel; ĉiam oni devas procedi laùleĝe. De supra instanco venis la ordono pri aresto; do ankaù de supre devas veni la ordono liberiga. Nu, Napoleono estas reveninta de apenaù dek-kvin tagoj; la koncernaj leteroj pri tiaj juĝaj nuligoj ankoraù estas sendotaj."- "Sed", demandis Morrel, "ĉu ne estas eble nun rapidigi la formalaĵojn, kiam ni triumfas? Mi havas kelkajn amikojn, kelkan influon; mi povas elpeti nuligon de la arestordono."- "Arestordono neniam estis."- "Lian enskribon en karceran registron, tiuokaze."- "Por kulpoj politikaj ekzistas neniu karcera registro; estas kelkfoje necese al registaro, ke viro malaperu lasante neniun postsignon; tia enskribo faciligus enketon."- "Tiel povis esti dum la Burbon-a reĝimo, sed nun..."- "Tiel estas ĉiam, kara sinjoro Morrel; registaroj sekvas kaj similas unu la alian; la punsistemo starigita de Ludoviko XIV-a, kun escepto de la Bastille, ankoraù nun funkcias tute same. La imperiestro ĉiam estis pli severa ol la granda reĝo mem pri la regularo de siaj malliberejoj, kaj nekalkuleblaj estas la enkarcerigitoj, kies ĉeeston iean neniu registro atestas". Tiom da bonvolaj klarigoj povus ŝanceli konvikiton; kaj Morrel eĉ nenion suspektis. "Sed tamen, sinjoro de Villefort, kion vi konsilas al mi por akceli la revenon de l'kompatinda Dantes?"- "Nur tion, sinjoro: sendi petskribaĵon al la justicministro."- "Ho! sinjoro, mi scias pri la efiko de petskribaĵoj; la ministro ricevas ducent ĉiutage kaj legas ne pli ol kvar:"- "Estas ĝuste" rediris Villefort," sed li legos petskribaĵon, kiun mi mem speciale rekomendas kaj rekte sendas."- "Sinjoro, ĉu vi estus tiel afabla, ke vi mem bonvolus prizorgi tiun petskribaĵon?"- "Kun plej granda plezuro. Dantes iam povis esti kulpa, sed li ne plu estas kaj estas mia devo nun liberigi tiun, kiun mi ankaù pro devo foje malliberigis." Villefort evitis tiamaniere la danĝeron de enketo ne certa sed tamen ebla, kiu lin senmanke pereigus. "Sed kiel oni devas skribi al la ministro?"- " Eksidu ĉi tien, sinjoro Morrel", respondis Villefort dum li disponigis al la ŝipekipisto faciligan lokon ; "mi nun diktos al vi".- "Kiel afabla vi estas!"- "Sendube, sed ni ne perdu pli da tempo; ni ja eĉ perdis tro multe."- " Jes , sinjoro; ni pensu pri la kompatindulo, kiu atendas, suferas kaj eble mal-esperas". Villefort ektremis imagante tiun malliberulon, kiu lin malbenas en silento kaj mallumo, sed li nun estis tro implikiĝinta por paŝi malantaùen; Dantes estis nepre oferenda sur la altaro de lia ambicio. " Mi atendas, sinjoro", diris la ŝipekipisto sidante sur la apogseĝo de Villefort kun plumo ĉemane.

Tiam Villefort diktis la pet-skribon en kiu li por bonega celo montris Dantes, kiel ekstreman patrioton, kiu laùdinde servis la bonapartismon; plue, estis skribite

ke Dantes fariĝis plej aktiva elemento por la reveno de Napoleono; kompreneble, vidante tian dokumenton, la ministro tuj devus justigi la aferon se ĝi ankoraŭ ne jam estis. Diktinte la petskribon, Villefort ĝin relegis laŭtvoĉe.
" Jen", li diris," kaj nun vi tute fidu al mi."- "Ĉu vi baldaŭ sendos tiun skribaĵon?"- "Jam hodiaŭ."- "Ĉu kun via rekomendo?"- "La plej bona rekomendo estas, ke mi atestu ĉion, kion vi diras sur la skribaĵo mem." Kaj Villefort eksidis kaj skribis sian ateston en angulo de la letero.
"Kaj nun kion mi faru, sinjoro" demandis Morrel. "Nur atendu. Mi zorgos pri ĉio." Tiu aserto redonis esperon al Morrel; li forlasis ravite la reĝan vicprokuroron kaj iris al la maljuna patro de Dantes por diri al li, ke li baldaŭ revidos sian filon.

Sed Villefort, anstataŭ sendi la petskribaĵon al Parizo, zorge konservis ĝin, ĉar tiu dokumento, kiu savus Dantes en la nuna tempo, terure lin mem estontece kompromitus se, laŭ la aspekto de Eŭropo kaj la politika evoluo okazus dua restarigo de reĝeco. Tiamaniere Dantes restis mallibera; sola en la profundo de sia ĉelo li aŭdis nek la tondran bruon, kiun faris la renversita trono de Ludoviko XVII-a, nek tiun ankoraŭ pli teruran, kiam la imperio frakasiĝis.

Sed Villefort atentis ĉion per viglaj okuloj kaj strečitaj oreloj. Dufoje dum tiu mallonga reapero imperia, kiun oni nomas la Cent Tagoj, Morrel revenis petegante kun insisto por Dantes, kaj ĉiufoje Villefort faris al li promesojn esperigajn; fine okazis la batalo de Waterloo. Morrel ne reiris al Villefort. Li estis farinta por sia juna amiko, ĉion kion li humane povis fari. Genove klopodi dum tiu Dua Restarigo signifus senutilan kompromitiĝon.

Ludoviko XVIII-a revenis sur la tronon. Villefort, kiu nun havis tro konscienco-riproĉajn rememorojn en Marsejlo petis kaj ricevis la vakantan oficon de reĝa vicprokuroro en Toulouse....

...Kaj pro tio Dantes, dum la Cent tagoj kaj post Waterloo, restis forgesita, se ne de l'homoj, almenaŭ de Dio.
...Mercedes restis sola sur tiu nuda tero...Ŝi foje sidis ĉe la marbordo, senĉese demandante al si ĉu ne estus preferinde sin klini antaŭen, sin allasi al sia propra pezo, sin enŝovi en tiun abismon kaj droni en ĝin, ol plu suferi tiajn kruelajn alternativojn de senespera atendado...Nur religiemo malpermesis al ŝi sin mortigi.

... Maljuna Dantes, kiun plu vivtenis nur espero, perdis tiun esperon, kiam falis la imperiestro. Precize kvin monatojn post la malapero de sia filo kaj preskaŭ je la horo de la aresto, li lastfoje spiris en la brakoj de Mercedes. Sro Morrel pagis ĉiujn kostojn de lia enterigo plus etajn ŝuldojn, kiujn faris la maljunulo, kiam li estis malsana.

Tiel agi estis pli ol bonfare; estis kuraĝe. Ĉar la Sudo estis ekfajrigita; helpi, eĉ ĉe mortolito la patron de bonapartisto tiel danĝera, kiel Dantes, tio estis krimo!

Tradukis Roland Dupuis

(daŭrigota)

LIBELETO

Libeleto gaje dancis
en balanca florkaliko;
lulis ŝin milda venteto
laŭ ritmo de la muziko.

Gardis ŝin mil sveltaj kanoj
en la blua lagpalaco,
kies muroj estis brilaj,
kiel fora, stela paco.

Sed venis la zuma vespo
kiel lanco nigra-flava
kaj sin kaŝis libeleto
en kristalazilo rava.

verkita de L. Tihanyi

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaùa problemo

LITERSUPO

La trovotaj legomoj estis:artiŝoko, celerio, fazeolo, karoto, kukumo, melongeno, poreo, skorzonero, spinaco, ŝenoprazo.

La "buljona" frazo estas: Resti apud leono estas danĝere.

Skrablo-problemoj

Ne multaj legantoj ŝajne interesiĝas pri la eldonado de tiuj problemoj. Ni atendas kelkajn pliajn aliĝojn por lanĉi tiun eldonon.

NOVAJ ENIGMOJ

Silab-enigmo: AK AL AN AR BO BO CO DA DA DO DO DO ED EL ER FO FO GI GO ĜI ĜI IN IN IR JA JE JO KO KO LA LO LO MA MO NA NA NO NO NO NO NO NU OF ON OR OS OS PI PO PO PU RA RA RO RO SA SU TE TO TO VA VE VI ZO ZO ZO.

El la supraj 66 silaboj formu 33 dusilabajn vortojn kun la jenaj signifoj:
1. Mara malglataĵo.- 2. Homa korpoparto - 3. Skribilo - 4. Forta trinkaĵo - 5. Malmolaĵo en la korpo - 6. Vira vesto - 7. Akva kreskaĵeto 8. Dorsa elstaraĵo - 9. Dramparto 10. Ĉieldirekto - 11. Manĝata radiko 12. Vivkunulo - 13. Frukto - 14. Multfoje - 15. Eterna urbo - 16. Knabina nomo - 17. Vulkana eligaĵo 18. Malfalsa - 19. Metalhava ŝtonaĵo 20. Senvesta - 21. Meritanta - 22. Lavilo - 23. Germania riverego 24. Medikamenta kvanto - 25.Salteganta insekto - 26. Senpatrina knabo 27. Saltanta amfibio - 28. Sencele iradi - 29. Skandinavia ĉefurbo 30. Japana monero - 31. Rivero en Italio - 32. Grenbrando - 33. Virina nomo.

La komencaj literoj de la vortoj formas diraĵon de la germana poeto Johann Wolfgang Goethe.

Enigma tombsurskribo: Sur orientlanda malnova tombŝtono oni povas legi: " Haltu vojaĝanto, kaj diru pian preĝon por la animo de la ĉi tie ripozanta Diofanto. Lia junaĝo plenigis la sesonon de lia vivo. Post tio pasis dek-duono de lia vivo, kiam komencis kreski la barbo sur liaj vangoj. Seponon de lia vivo post tio li fondis familion. Kvin jarojn poste naskiĝis filo; sed tiu ido mortis, kiam li apenaŭ transpaŝis la duonon de la aĝo, kiun lia patro atingis. Diofanto vivis ankoraŭ kvar jarojn dum kiuj li trovis konsolon en la scienco de la nombroj."

La tasko de la legantoj estas diveni la aĝon, en kiu Diofanto finis la malĝojan vivon.

LA VIVO EN GRESILLON

Karaj Geamikoj,

Ni ofte ricevas riproĉleterojn de legantoj, kiuj, tute prave, skribas:" Kial ni, amikoj de Kulturaj Kajeroj, estas devigataj peti, kiel la aliaj esperantistoj, la jaran programon de la aktivaĵoj en Gresillon. Tiu programo aperas en aliaj esperantlingvaj revuoj, ne en Kulturaj Kajeroj. Strange, ĉu ne?" Jes, strange! Do, legu ĝin ĉi-sube.

De la 24-a de marto ĝis la 1-a de majo: Internacia Renkonto de Infanoj: kursoj, promenadoj, distraĵoj. Verkado de staĝ-gazeto.

De la 23-a de junio ĝis la 8-a de julio: Internacia Amika Renkonto: nedeviga programo; kursoj, gvidata konversacio, komunaj promenadoj, distraj vesperoj.

De la 8-a de julio ĝis la 21-a de julio: Seminario Cseh "A": unuanivela seminario pri Cseh-instrumetodo (Ewa Bondar); kursoj de du niveloj; gvidata konversacio.

De la 22-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto: Seminario Cseh "B": dua nivela seminario pri Cseh-instrumetodo (Ewa Bondar); kursoj de du niveloj; gvidata konversacio; uzado de "sorobano" kaj paper-faldado (Kimie Markarian).

De la 5-a de aŭgusto ĝis la 18-a de aŭgusto: kursoj 1-a kaj 2-a nivelaj; unua semajno (F. Boyet): gramatiko; dua semajno (G. Lagrange): tradukado. gvidata konversacio.

De la 19-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro: Por la Esperanto-instruantoj: pedagogia helpo; helpiloj; kursoj; gvidata konversacio.

Ankaŭ okazos inicado al metiaj laboroj el kiuj libro-bindado en julio kaj korbo-farado en aŭgusto.

La antaŭlastan tagon de ĉiu studperiodo estos organizataj sesioj de la ekzamenoj de la Franca Esperanto-Instituto. La kandidatoj al la 3-a kaj la 4-a ekzamenoj bonvole sin anoncu sur la aliĝilo.

Riĉa biblioteko estos je la dispono de la ĉeestantoj por pruntado de libroj, kaj la Libro-Servo proponos tre diversajn librojn, novajn aŭ malnovajn, por aĉetado.

Ĉar la poŝt-elpezoj estas tre gravaj, bonvolu, kiam via letero postulas respondon aŭ se vi deziras ricevi konfirmon de via ĉambro-rezervado, aldoni poŝtmarkon aŭ respond-kuponon.

Sendu viajn inform-petojn kaj, nepre viajn aliĝilojn al:

Esperanto-Domo, Inform-servo
17, rue César Franck
F-44240 La Chapelle-sur-Erdre

La administrantaro de Gresillon iom post iom plijuniĝas. Tio signifas, ke la geamikoj, kiuj, unuaj, dank'al sia sindediĉo al la vivigo de la Esperanto-Domo dum la "pioniraj" jaroj, iom post iom malaperas. Ege bonvoleme, kaj ankaŭ diskrete sed efike, siatempe laboris Georges kaj Odette CIRET. Li mortis antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi forpasis antaŭ kelkaj monatoj.Ankaŭ al ili Gresillon ŝuldas sian ekziston. Ilian familion ni elkore kondolencas.

LIBRO-SERVO

NOVAJ ELDONOJ

Lernolibro:	Tendaraj Tagoj (S. Mac Gill)		kajero 1: 37f. kajero 2: 46f.
Muziko:	Muzika terminaro	32 f.	
	Esp° kaj muziko	32 f.	Eldonoj della
	Kuniĝu ni per nia kant'	32 f.	Internacia Esp°-Floro
	Internacia Esp°-Floro (kas)	45 f.	
Reeldonoj:	Fundamenta Krestomatio	150 f.	
	Originala Verkaro	220 f.	

Petu la katalogon; donacu librojn al viaj nepagipovaj korespondantoj, ĉefe al la ekssovietanoj, kaj afrikanoj.

Informoj kaj mendoj: S-ino J. VINCENT, 26 bis, rue de Milngavie;
49150 - BAUGE

Ne sendu monon, atendu la fakturon. Se via mendo atingos 500f., vi ne pagos sendokostojn.

Niaj perkorespondaj kursoj

Por komencantoj: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Por praktikantoj: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkigoj, taskoj sendotaj por korektado.

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.


Supera kurso: de- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri KApableco.

Prezo de la kurso: 150 f.f.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Diri « pli » anstataû « plu » oni povas tre ofte, sed ne ĉiam. « Pli » = multe ; « plu » = daûre, pli malproksimen. « Pli » signifas kvanton, multecon ; « plu » signifas daûradon (en loko aû tempo) ».

Lingvaj respondoj.



— Kial mi ne kreskis pli ?



— Ne pli ol tri metrojn pluajn. Poste ni povos ripozi.



— Se vi ne ŝatas akvon ni ne kreskos plu !

Niaj perantoj

Aûstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aûstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aû 25 internaciaj respondku ponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN